

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Ben. spk.}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SMIEDER 55 STRAAT 51

5^a JARO

N^o 1

JUL. 1929.

JARA ABONO

BELGUJO : 6,— Bfr.

EKSTERLANDO : 2 Belg.

La unua „lustrum” de A. P. P. K.

La 22an de la nuna monato A. P. P. K. memoros la 5an datrevenon de sia fondiĝo. Denove grava paŝo en la historio de la loka movado estas farita. Kontente ni povas rerigardi la faritan vojon. Ni sekvis ĝin bone, rekte, neŝanceliĝante, la vojon al nia celo, malgraŭ la malhelpoj, kiuj kelkfoje malebeniĝis ĝin.

Jam de post kvin jaroj la ĉefaj Esperanto-grupoj de Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵoj laboras en plena interkonsento por la komuna idealo. Kaj tiu kunlaborado donis la plej belajn rezultatojn iam atingitajn.

Dank'al A. P. P. K. ekzistas kaj funkcias ankoraŭ la urbaj vesperkursoj de Esperanto. Sen nia organizaĵo oni neniam estus parolinta pri la oficiala instruado de nia lingvo, ĉar malfeliĉe troviĝas ankoraŭ en nia urbo personoj, kiuj opinias ke la instruado de Esperanto precipe devas servi por alporti novajn anojn al grupo kaj por enspezi de ili kiel eble plej multe da mono.

Sed A. P. P. K. ne kontentiĝis pri tiu rezultato, kiu tamen jam per si mem povus sufiĉi, ĉar se en ĉiuj lokoj, kie estas Esperanto-grupo, oni estus atinginta la oficialan instruadon de Esperanto, la internacia helplingvo estus akirinta la honoron, kiun ĝi meritas. A.P.P.K. ne limiĝis sian propagandon je Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵoj, sed disaŭdigis fortan vokon tra la Flandraj provincoj. En ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, sen iu escepto, falis almenaŭ unu semero. Belegan rikolton ni faris: 400 personoj, el ĉirkaŭ 100 diversaj lokoj, aliĝis al ni kaj sekvis niajn skribajn kursojn.

A. P. P. K. per sia propra skriba kurso „Appko” speciale distingiĝis kaj metis sin tiurilate sur la plej unuan lokon en la landa movado. Neniam antaŭe iu grupo aperigis tian bonan, tian kompletan, tian detalan verkon por la memlernado de Esperanto. Ĝi inde kronas nian kvinjaran laboradon.

Ni tamen ne ripozu sur niaj laŭroj. Multaj nekulturitaj kampoj kuŝas ankoraŭ antaŭ ni. Ili donos al ni laboron dum multaj jaroj. Antaŭen do, al la laboro. Kun freŝa kuraĝo kaj nova entuziasmo ni eniru nian duan „lustrum” !

A. P. P. K.

A. P. P. K. Oficialaj Komunikoj.

Vizito al la tombo de Sro A. Posener.

Por komenci la serion de la solenaĵoj okaze de la 5a datreveno de la starigo de A. P. P. K., oni faros komunan viziton al la tombo de nia neforgesebla, unua ĝenerala sekretario, s^{ro} A. Posener, en Holanda Putte, dimanĉon, la 30an de junio 1929.

Oni povas nun facile veturi ĝis la Holanda landlimo per la „ruĝa” tramo.

Oni kunvenos ĉe la forveturejo de Paardenmarkt je la 1a.30 p. m. Forveturo je la 2a akurate.

Tiuj kiuj deziras veturi per aŭtobuso devas forveturi de Statieplein je la 2a.

Biciklistoj kunvenos ĉe la tramhaltejo de Schijnpoort je la 1a kaj forveturos je la 1a.30.

Oni atendos ĉe la landlimo ĝis la 3a kaj tiam eliros kune al la tombejo.

La disdono de la diplomoj de la urbaj vesperkursoj.

Pro la propagando A. P. P. K. rezignis je la favoro kaj honoro disdoni mem la diplomojn de la urbaj vesperkursoj. Komence de la nuna jaro la urbestro mem disdonos ilin samtempe kun tiuj de la aliaj profesiaj kursoj. La disdono okazos la 10an de julio, je la 7a vespere, en la Urba Festsalonego, Meir. La diplomitoj ricevos verŝajne specialan invitkarton kaj ni esperas ke ili faru ĉion eblan por ĉeesti. Ni provos havigi al la samideanoj la necesajn invitkartojn por ĉeesti tiun novan paŝon sur la vojo al la oficiala rekono de Esperanto.

Eskurso al Hemixem.

Dimanĉon, la 21an de julio, okazos la kutima ekskurso al Hemixem kun vizito al la familio Keverijn. Forveturo per aŭtobuso aŭ per vaportramo je la 2a p. m. Oni veturos ĝis Aertselaar, Huis-ten-Halve. Por tiuj kiuj preferas alian vojon, ĉu per tramo ĝis Kiel-Kongo, de tie rekte per aŭtobuso ĝis Hemixem, ĉu per tramo ĝis Schoonselhof, de tie piede ĝis Hemixem, ĉu per trajno, ĉu per boato „Wilford” ĝis Hemixem, ni komunikas ke ĉiuj zorgu esti en Hemixem je la 4a.

Festo de A. P. P. K.

La festo je la honoro de la diplomitoj de la urbaj vesperkursoj, kaj okaze de la 5a datreveno de la starigo de A. P. P. K. okazos verŝajne je la fino de la monato oktobro. Ĝi konsistos el koncerto kaj balo. Ni petas la kunlaborantojn anonci sin sufiĉe frue.

Nia dua skriba kurso.

La lasta leciono de la skriba kurso laŭ la metodo „Appko” aperos la 27an de la nuna monato.

Por ebligi al niaj lernantoj havi ateston pri ilia studado, A. P. P. K. organizas ekzamenon, post kiu la partoprenintoj povas akiri la diplomon pri skriba kapableco en Esperanto.

La venonta ekzameno okazas dum la monato oktobro. La partoprenintoj devas anonci sin antaŭ la 1a de oktobro al la prezidanto de A. P. P. K., Boomsche steenweg, 444, Antwerpen. Nur la lernantoj de la skribaj kursoj de A. P. P. K. havas la rajton partopreni en la ekzameno, pagante 5 fr. por la elspezoj. Oni povas sendi la monon per monbileto en simpla letero aŭ pagante la sumon en la poŝtĉekkonton n^o 230115 de s^{ro} Jacobs.

Pri nia „Bulteno”.

Pro la seninterrompa laborado, kiun postulis de miaj kunlaborantoj kaj de mi mem, dum la pasintaj ses monatoj, la verkado kaj presigado de la skriba kurso „Appko”, ne plu restis al mi la necesan tempon por prizorgi la redaktadon kaj eldonadon de nia „Bulteno”. Al ĉiu forto estas limo kaj ankaŭ al la nia. Nun kiam la kurso „Appko” finiĝis, mi denove povas daŭrigi la redaktadon de la „Bulteno”, despli ĉar evidentiĝis ke ĝia ekzistado estas dezirata kaj estas necesega. Sed por ke la „Bulteno” fariĝu kaj estu tio, kion ĝi celis ĉe sia starigo, la kunlaborado de ĉiuj estas necesa. Por ke ĝi povu regule aperi je la komenco de la monato la manuskriptoj devas alveni antaŭ la 20a de la antaŭa monato. Ni insiste petas ĉiujn grupojn regule komuniki ĉiujn informojn kaj raportojn pri la grupa vivado.

LA REDAKTORO.

Plialtigo de la abonprezo.

Jam de longe la „Bulteno“ (presado kaj forsendado) kostas al A.P.P.K. pli ol la ĝis nun fiksita abonprezo. Tial la estraro estis devigita plialtigi ĝin. De nun ĝi estos 6 fr. jare por Belgujo kaj 10 Bfr. por la eksterlando. Ni petas la abonantojn, kiuj ne ankoraŭ pagis, tuj sendi 3 Bfr. 5 Bfr., por la venonta duonjaro.

IOM DA GRAMATIKO.

Decido de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, pri la prefikso „mis“.

Ĝia signifo estas severe limigata al la senco: **erar —, malĝust —, malbon —.**

La baloto donis la jenan rezulton:

aprobis la oficialigon: 72

malaprobis ĝin: 39

ne montris sian opinion: 2

Sekve, la prefikso „mis“ fariĝas de nun **oficiala** laŭ la suprenomita senco.

Laŭ: „Espero Katolika“ de la 15a. de Junio 1929.

GRUPA VIVO.**La Rekta Vojo.**

Kiam „La Rekta Vojo“ kunvenas?

—Sabaton, la 29an de Junio: Amuza vespero en la sidejo: Café Amical. — Statiestraat. — (je la 8a 1/2)

—Dimanĉon, la 30an de Junio: Ekskurso kun A.P.P.K. al Holanda Putte. Pliajn informojn en la Bulteno.

—Sabaton, la 6an de Julio: Vespera ekskurso al Sankta Anjo. Oni kunvenu je la 8a. Sui-kerrui, je la fina halto de la tramlinio 2.

—Dimanĉon, la 7an de Julio: Ekskurso tuttaga al Heide-Calmphout. Oni kunvenu al la centra stacidomo je la 8 1/2 a. matene (la vagonaro forveturos je la 8.53 a.) Kunportu manĝaĵojn kaj bonhumoron.

—Merkredon, la 10an de Julio: Oficiala disdono de la Diplomoj al la lernintoj de la vesperkursoj. (Pliajn informojn en la Bulteno).

—Sabaton, la 13an de Julio: Amuza vespero, kantado: en la sidejo. (Je la 8 1/2 a.)

—Dimanĉon, la 14an de Julio: Boatekskurso al Vlissingen. (vidu en la Bulteno).

—Sabaton, la 20an de Julio: Kinematografvespero en la sidejo je la 8a.

—Dimanĉon, la 21an de Julio: Ekskurso al Hemixem (Pliajn informojn en la Bulteno).

—Sabaton, la 27an de Julio: Intima kunvido je la 8a 1/2 en la sidejo.

—Sabaton, la 3an de Aŭgusto: Vizito al la Hobokena Grupo. Oni kunvenu je la Verda Placo je la 7a 1/2.

Dum viaj ekskursoj }
Dum viaj vojaĝoj } ne forgesu vian

KODAKPATATON.

Riprezentanto: Sro CROLS. - Meir 15.

RAPORTO PRI EKSKURSO

de „La Rekta Vojo“ al Peersbosch, la 12an de Majo 1929.

La bela maja suno allogis multajn gesamideanojn Antverpenajn kaj Hobokenajn al la Malnova Bariero, por kune ekskursi.

Ĉiu kunportis ne nur la necesan manĝaĵon, sed ankaŭ la pli necesan bonhumoron.

Kelkaj minutoj antaŭ la dua, la prezidanto, eskortata de tri gekunekskursontoj, majeste aperis el la mi-ne-plu-scias-kioma el urbo venanta tramveturilo.

Tuj ni elektis la rektan vojon al Peersbosch, sed apenaŭ la tridekkapa besto eliris, kiam kviete en herbejo maĉanta ĉevalo, subite timigata, ekkuregadis, kun voŝto levita kiel plumo en vento, kaŭze de terura blekado, kiun iu ne-al-nia-civilizacio-apartenanta membro aŭdigis.

Interkonatiĝante kaj interbabilante ni daŭrigis laŭlonge de belaj vilaoj kaj junverdaĵoj kampoj, altkreskaj arboj kaj dolĉondetanta rivereto.

Dumvoje oni nur haltis unu fojon, por ebligi al dika, malfruinta ano atingi la grupon. La malfeliĉulo finfine alvenis, kun papavruĝa, ŝviteganta kapo, blovante kaj vaporspruĉante kiel lokomotivo.

Arda suno brilis kaj pelis nin baldaŭ en la arbaron, kiun ni tamen baldaŭ denove forlasis por honori per nia vizito la dikān estrinon de la laktejo Peersbosch-a.

La freŝa aero videble malplenigis la stomakojn, ĉar tuj, kiel aro da malsatuloj, la ekskursantoj ekkomencis manĝegadon, kiu ŝajnis senfina. Kiel ĉiam, la plej grandaj

pri-malsat-suferantoj ne kunportis buŝprovizon, sed kalkulis je la bonvolemo kaj malavareco de la aliaj.

Post refreŝigo kaj refortigo oni eliris por ludadi en vasta herbejo apuda. La vetkuroj treege estis ŝatataj; la vir- kaj virinseksaj vetkurintoj plej entuziasme entreprenis la lukton por venki. Intertempe, la Kodakaparatoj zorgis por rememoraĵoj pri la ekskurso.

Fine, la Rekt-Voja Ĥoro grupigis sin kaj kantis diversajn Esperantajn kantojn. Baldaŭ la disigitaj neesperantistoj alproksimiĝis kaj je nia granda miro, aro da homoj plej atente aŭskultis la nekonatajn kantojn kun strangaj vortoj, aŭ kunkantetis la konatajn melodiojn.

Kiam kun la kruroj ankaŭ la gorĝoj laciĝis, Sro Lodema profitis la okazon alparoli la ĉirkaŭstarantojn kaj kompreneble propagandi Esperanton kaj la Esperantajn vesperkursojn.

Post tiu parolado, kiu ege ŝajnis esti ĝuata, ni ekpretigis nin al la reiro. Sed, atendi ĉiam longe daŭras, kaj la plej rapidaj malpacienuloj atendante, iom kegloludadis. La Rekta Vojo speciale sin montris „all-round“-societo, kiu ne nur enhavas entuziasmajn Esperantistojn, gajajn amuzantojn, famajn verkurantojn, artistojn je kantarto kaj naskitajn paroladantojn; ĝi ankaŭ posedas tutan serion da premiindaj keglojetantoj.

Vesperigis dum nia reveno al la urbo; ni ne nur vidis tion al la subiranta suno kaj la malheliĝanta aero, sed ni ankaŭ sentis tion al la kruroj. Je la „Malnova Bariero“ kelkaj forlasis nin, dum la aliaj adiaŭis apud glaso da biero. Tiel la vesperiĝo ankaŭ atingis la cerbojn kaj ne tro frue sed plej kontente oni hejmen revenis. HOKO.

Boatekskurso al Vlissingen.

Dimanĉon, la 14an de Julio venonta, boatekskurso al Vlissingen per la salonboato „Stad Gent“. Foriro de la flosponto: Suikerrui, je la 7.30 h. matene precize. Prezo: por membroj fr. 17.50; nemembroj fr. 20.—. Tikedoj akireblaj ĉu ĉe s-ro A. Lodema, Kalverstraat, 12, Dam; ĉu sa-

batvespere en la sidejo de L.R.V. Ne forgesu vion pasporton kaj bonhumoron.

ONI FLUSTRAS...

... ke la „Bulteno“ de A.P.P.K. reaperas kaj

... ke tiu reapero estas daŭra kaj regula kaj ankaŭ

... ke la kompostisto ne faros komposterarojn.

... ke la enhavo de la „Bulteno“ estos tre leginda, dank' al tiu ĉi rubriko.

... ke la Hobokena Grupo la Rektvojanojn volonte vidas en sia mezo kaj reciproke.

... ke la unuenomita grupo profitas de tiuj vizitoj organizante loterion, sed

... ke la tri kvaronojn de la premioj gajnas la Hobokenanoj mem.

... ke la junaj Hobokenaninoj pli ŝatas danci kun la pli aĝaj, ol kun la junaj sinjoroj.

... ke la sekretariino kaj la kasistino de „La Rekta Vojo“ estas la plej diligentaj el la tuta estraro.

... ke la parolado de la prezidanto de L.R.V.: „La Kanto kiel Propagandilo“ rikoltis grandan sukceson kaj...

... ke la membroj avide atendas pli da tiaj paroladoj utilaj.

... ke oni intencas grupigi ĉiujn grupojn en Flandrujo en unu federacio, sed,

... ke tio estos tre malfacila laboro, precipe rilate tiujn grupojn, kiuj nuntempe apartenas al la Belga Ligo Esperantista.

... ke tiu ĉi rubriko, kiam ĝi plaĉas al la legantoj, estos daŭrigata de

Aŭskultemulo.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64. Antwerpen.

Presejo SELE & VAN DER MAST

Prinsesstraat, 11 — Antwerpen.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENJA PROPAGANDA
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:

Ben. KEM.

ADMINISTRACIO

5a JARO

Nº 2

AUGUSTO 1929

JARA ABONO

BELGUJO : 6.— Bfr.

EKSTERLANDO : 2 Belg.

Esperanto en pedagogiaj kongresoj.

En Genève okazos de 25a de julio ĝis 4a de aŭgusto la tria kongreso de la Mondfederacio de Edukasocioj. Kunvenos pli ol 5000 geinstruistoj. La Mondfederacio ampleksas ĉefe amerikanojn kaj la anglan instruistan asocion N.U.T., kaj la angla lingvo, la nacia konkurulo de la internacia lingvo, tie regas kaj ankaŭ regos en Genève. Des pli grave por ni estas, ke tiu granda internacia kongreso en tri sekcioj ankaŭ uzos Esperanton. D-ro Privat sidas en la Honora Komitato. Li faros en la kongreso prelegon pri la temo : „Esperanto en la servo por edukado al repacigo de la popoloj”. La Mondfederacio eldonis sian kongresprogramon ankaŭ en Esperanto. Prezidanto de la Organiza Komitato estas Prof. Bovet, direktoro de la Internacia Eduka Oficejo en Genève, la konata gvidanto de la Internacia Packonferenco en Praha „Paco per Lernejo”, kiu aplikus Esperanton. Prof. Bovet ankaŭ estas membro de la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperant-

istoj (T.A.G.E.). La laborojn de T.A.G.E. dum kaj por la kongreso preparas kaj gvidos Prof. D-ro Dietterle. Do entute gravaj bonŝancoj por Esperanto en unika, eble decida situacio : en granda internacia fak-kongreso.

Preskaŭ samtempe, de 8a ĝis 21a de aŭgusto, okazos en Helsingör (Danujo) la 5a kongreso de la Internacia Laborrondo por Nova Edukado. La ĝenerala sekretariino de tiu Laborrondo, Clare Soper-London, informis nin, ke okazos Esperanto-tradukoj de la ĉefaj matenaj prelegoj, se T.A.G.E. zorgos por tradukantoj kaj ke tiuj tradukantoj ne bezonas pagi la kongreskotizon. D-ro Ferrière-Genève, la redaktoro de la franclingva organo de la Laborrondo, certigas, ke Esperanto estos aplikata, se esperantistoj partoprenos la kongreson. Li deziras, ke „la kongreso en Helsingör estu bela manifestacio por Esperanto”. Sinjorino D-ro Rotten, sekretariino de la germana sekcio de la Laborrondo, en la lasta kongreso en Locarno, aplaŭdite de la kongresanoj diris : „Ĝis la venonta kongreso ĉiu

devas lerni Esperanton". La redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo, D-ro Kurt Riedel-Dresden, estas invitita, paroli en la kongreso, ne kiel redaktoro, sed kiel pedagogo. La programo jam montras lian nomon.

Bonvolu ekkoni bonŝancojn de tiu situacio! Mi eĉ pretendas nomi tiun situacion, kiam pedagogiaj internaciaj kongresoj provas kaj deziras uzi Esperanton, historia momento por la Esperanto-movado.

Laŭ „Heroldo de Esperanto" nº 24.

NIA VIZITO AL LA TOMBO DE S-RO A. POSENER.

En nia lasta kunsido ni decidis rememorian ĉiam karan unuan sekretarion, S-ron A. Posener, dimanĉe la 30an de junio.

El ĉiu grupo aliĝinta al A.P.P.K. partoprenis delegitoj kaj anoj, tiel ke entute ĉeestis tri-deko da personoj.

Tio jam sufiĉe montras kion la veraj esperantistoj sentas por nia kara kaj sindonema A. Posener. La plimulto de la partoprenintoj forveturis de la Paardenmarkt per la ruĝa tramveturilo, dum aliaj per biciklo atingis la landlimon, de kie ni kune promenis al Putte, al la tombo de nia neforgesebla samideano.

S-ro J. Jacobs, prezidanto de A.P.P.K., kaj S-ro J. Swalf, prezidanto de la Antverpenaj Diamantistoj Esperantistoj, dediĉis ambaŭ kelkajn vortojn al nia altestimata A. Posener. Post kiam florbukedoj estis metitaj sur la tombo, ni fine reveturis tute emociigitaj de la simpla, sed vere elkora solenaĵo.

Parolado de S-ro Jacobs ĉe la tombo.

Estimataj Gesamideanoj, Trian fojon ni staras ĉirkaŭ la tombo de nia neforgesebla samideano Aron Posener, la unua ĝenerala sekretario de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato; trian fojon ni troviĝas ĉirkaŭ tiu peco da tero, kiu fariĝas al ni karega, ĉar ĝi tenas en si la cindrojn de homo, kiu estis ĉies amiko, kiu postulis ĉies respekton.

Sed mi dubas ĉu mi bone agis malkvietigante la pacon tie ĉi regantan por provi es-

primi tion, kion ni nun ĉiuj sentas, sed kion tamen ni ne sukcesas elmontri per homaj paroloj. Mi dubas ĉu mi tiam ne pli bone farus sekvante la lastan peton de nia kara formortinto „Ĉiu el ni, dum laboro aŭ promenado restu je la tago de la morto de la Majstro, senmova, nur unu minuton, pensante respektplene al tiu vivo, tiel senprofite donita por la efektiviĝo de idealo, kaj aŭdigas nur la korbatoj de tiuj homoj, kiuj ankaŭ akceptis tiun idealon."

Sed mi ne povas silenti, kara Samideano. Tro fortaj estas niaj korbatoj. Nekontraŭstarebla estas bezono por esprimi niajn sentojn.

Kvankam nur malofte ni povas veni tien ĉi por doni materialan pruvon pri nia daŭra memoro, pri nia alta estimo, pri nia profunda admiro, pri nia esprimebla danko, ni certigas al vi ke niaj spiritoj ankoraŭ ofte, daŭre kunigas kun la via en la penado por atingi la fiksitan idealon. Via noblanima ekzemplo staras ĉiam antaŭ ni montrante per neŝanceliganta, firma instiga gesto la sekvotan vojon, kiu devas konduki nin al la fina venko.

Ju pli malproksima estas la momento, kiam nia neforgesebla amiko estis inter ni, despli pure montriĝas antaŭ niaj okuloj la senmakula bildo de la vera esperantisto, la bildo de homo, kiuj plej perfekte reprezentas al ni la neprofiteman samideanon, kiu estas profunde penetrita de la homama misio de Esperanto.

Por sukcesigi la esperanto-movadon li silentigis la plej intencajn homajn senfojn, li silentigis personajn, politikajn kaj filozofiajn opiniojn.

Forte li staris en sia kredo en la utilegeco, en la necesego de la internacia lingvo. Malforte laŭ korpo, senĉese turmentata de senkompata malsano, li ne laciĝis, li ne volis koni ripozon kiam temis ion fari por nia movado.

Sed kio plej bone konigis lin al ni, estas liaj belegaj artikoloj, kiujn li verkis por la Bulteno de Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato. Ili estas kaj restos perloj en la originala Esperanto-literaturo. En ili

li metis sian tutan personecon. Simile al freŝa fonto, kiu nature kaj senartifike sprucas la helajn akvokristalojn, li per perloj de sia ĉiam vigla spirito instruis al ni la homamon. Senlima estis lia imago-kapablo, rapida lia kreopovo. Liaj artikoloj briltremetas pro delikata sentemo, pro rapida impresemo.

Kara amiko Posener, vi ja scias ke via foriro kaŭzis al ni grandan perdon. Sed via ekzemplo estos por ni daŭra instigo por daŭrigi nian entreprenitan taskon. Ni ĉerpos el via vivo la kuraĝon por ne lacigi, kiaj ajn estas la malfacilaĵoj, kiujn ni povos renkonti. Refortigitaj, kun pli da kuraĝo, ni foriros de tie ĉi. Ke la floroj, kiujn ni oferas al vi estu al vi agrablaj kaj traduku al vi ankoraŭ pli bone niajn sentojn de amo, respekto kaj danko.

KIEL LA AEROPLANO FUNKCIAS?

Neniu kontraŭdiros ke la paŝoj, farataj en la aviado, depost la tempo, kiam la fratoj Wright unuafoje flugis per aeroplano, estas grandegaj. En iom malpli ol kvarona jarcento, la kelkminutaj flugadoj iĝis veraj aervojaĝoj, kies daŭro atingis 150 horojn, kaj la aspekto de la aparato, post la diversaj aliigoj kaj perfektigoj, tiom ŝanĝis, ke oni tute ne plu kapablus rekonii en ili la malnovajn modelojn.

Je tiaj tagoj, aeroplano prezentas al ni tute ordinaran spektaklon; regulaj servoj por pasaĝer- kaj vartransporto funkcias en kaj inter la diversaj landoj kaj landpartoj kaj la aviado en la estonteco promesas esti tiel grava, ke ĉiu sentas la necesecon koni ĝiajn principojn.

Por kompreni kiel flugmaŝino funkcias, estas unue necese konsideri la aeron kiel substanceton, kiu havas pezon kaj premon kaj kiu emas kontraŭstari la korpojn kiuj ĝin volas trapasi.

Se, dum rapidega veturado, oni metas la manon ekster la veturilo, oni sentos la aeron, kvazaŭ preteriri al ĝi kun granda fortoco. Suprenklinante la manon, tiel ke ĝia plej supera parto estu je la flanko de la movdirekto, oni eksentos leviĝemon, kaŭzata de la aerokunpremado sub la manplato.

La plej simpla aplikado de tiu ĉi principo estas la flugludilo. Kelkaj malnovaj aeroplanoj estis efektive nenio pli ol grandaj flugludiloj, kun motoro kaj helico, kun direktiloj kaj klinaj flugiloj.

La modernaj aeroplanoj havas kurbaĵajn flug-

ilojn, super kiuj la turnanta helico kaŭzas partan vakuon, kies sucado pligrandigas la leveblecon. Kiam nun la aviadilo atingas sufiĉan rapidecon, la leviĝado, okazigata de la vakuosucado super la flugiloj, ebligas suban aerpremon, kiu iĝas pli granda ol la pezo de la maŝino, kaj ĝi leviĝas.

(daŭrigota)

GRUPA VIVO

LA REKTA VOJO

Kio okazos en la Rekta Vojo dum Aŭgusto?

Sabaton, la 3an: Vizito al la Hobokena Grupo. Oni kunvenu je la Verda Placo, je la 7 1/2a horo.

Dimanĉon, la 4an: Dua ekskurso al Heide. Oni estas petata kunveni, plimultnombre ol la unuan fojon, je la 9 1/2a. al la Malnova Bariero. Oni kunportu mangajojn.

Sabaton la 10an: Intima kunsido. Kantado. Ludado.

Lundon la 13an: Sonorilarkoncerto; je la 8 3/4a apud la puto de Quinten Matsijs.

Sabaton la 17an: Kinematografvespero en la sidejo, je la 8a. S-ro Crols, riprezentanto de la Kodakaparatoj por Antverpeno, Meir 15, montros al ni la taŭgecon de la Porinfanaj Kinematografaparatoj.

Sabaton, la 24an: Muzikvespero, en la sidejo, je la 8a.

Dimanĉon, la 25an: Posttagmeza ekskurso al Wilrijck. Oni kunvenu je la 2a al Dikke Mee.

Sabaton, la 31an: Vespera ekskurso al Sankta Anjo. Vizito al S-ro Libot. Kunvenloko: fina halto de tramveturilo 2, Suikerrui, je la 8a.

Kie restas la novaj grupoj?

Raporto pri la unua ekskurso al Heide.

La 7an de julio la Rekta Vojo ekskursus al Heide. Je la horo de l' forveturo ni estis jam kvarope kaj ni do decidis viziti kune la Ekspozicion pri la teknika instruado en la vastaj salonegoj de Harmonio. Manko de spaco en la Bulteno malebligas al ni detale raporti pri tiu tre interesa promenado de tri kokinoj kun unu koko.

Raporto pri . . .

VIZITO AL FOIRO

Jam kelkaj fervoruloj, je l' oka kaj duono, atingis la juĝejon, apud la tramperono.

Estante dek-triope, kvaronan horon poste, decidis ni atendi plenzorge, sed... senkoste. La malbenita nombro dek-tri nin iom ĝenis, ĝis kiam el la tramo dek-kvara an' alvenis.

Ĉi tiu alveninto, per sia ekapero,
malbonan antaŭsenton forviŝis el la sfero.
Vizito nun komencis; mallonga promenado,
kaj baldaŭ ni ekstaras sur la „danciga rado“.

Post iom da dancado en varma atmosfero,
de tie ni eliras en freŝa la aero.

Membrinoj sin amuzas, sukerpecetojn petas,
gustumas diligente, kaj tamen ne aĉetas.

Teatro de la puloj havigas emocion,
montrante de la bestoj la civilizacion.

Ni prenas do tikedon kaj tial tie haltas,
konstatas kun plezuro ke puloj ne nur saltas;

Sed ankaŭ ili dancas, pilkludas plej konscie,
kaj post reprezentado, publik' sin gratas ĉie.

Senhara membro nia en karusel' eksidas.
En brakoj de knabino ripozas li kaj... ridas.

Sin kredas li heroo de l' fama Venecio,
murmure ekaŭdiĝas gondola melodio.

Ĉe la fotografisto ni ĉiuj nun eniras.
Jam tri minutojn poste, la bildon ni admiras.

La vigla kasistino jen tronas majestplene,
Imponas rigardanton; sed ridas abomene.

La prezidant' de l' grupo, pro ĝojo li radias;
kun kap' de senharulo li ĉarme harmonias.

En ia salonego, ni vidas per speguloj
ke homa vivo estas nur trompo de l' okuloj.

Jen laŭte kriegadas ĵonglistoj, akrobatoj,
dum amatoj pafas al pipoj aŭ soldatoj.

Je l' fino de l' foiro vizitas ni barakon
en kiu ni per vafloj plenigas la stomakon.

Kaj tiel ree staras ni apud tramperono.
Noktmeze ĵus sonoritis, la horo de l' malbono.

Karnasaĵo.

La tria boatekskurso al Vlissingen.

Ĉu estas necese raporti pri nia tria boat-
ekskurso? Sufiĉus ripeti la raportojn de la
antaŭaj du vojaĝoj. Ni nur devus uzi la
komparativon: la unua vojaĝo estis bona;
la dua pli bona; la tria plej bona. Por la
kvara, kiu certe okazos venontan jaron, ni
tiutempe trovos la ĝustan esprimon.

Vetero brila, partoprenantoj ĝajaj, gedanc-
emuloj nelacigeblaj, junaj knabinoj ĉarmaj
kaj allogaj, iliaj vestaĵoj ŝtelindaj... kion
vi volas, karaj gelemantoj, ... kiel bela es-
tas la vivo je tiaj tagoj!

El ĉiuj grupoj, apartenantaj al A.P.P.K.,
ĉeestis riprezentantoj; la plej grandan
kvanton liveris „La Rekta Vojo“. Ankaŭ el
Lier ĉeestis 6 samideanoj. Tre bedaŭrinde
estis, ke multaj ĝeinstruisoj kaj kelkaj ŝtat-

oficistoj ne povis partopreni pro deĵoro.
Ho, mi jam sopiras la kvaran boatekskurs-
onal Vlissingen!

A. L.

ONI FLUSTRAS . . .

... ke diversaj membroj ĝis nun ne ricevis
la Julian numeron de la „Bulteno“.

... ke la unua numero de „Flandra Esper-
antisto“ donis bonan impreson.

... ke A.P.P.K. havas potencajn malami-
kajn, kiuj daŭre kaj sekrete kontraŭlaboras
kaj klopodas neniigi ĉian sukceson.

... ke tiuj kontraŭlaborantoj sin nomas:
la nuraj oficialaj Esperantistoj.

... ke la poeto de la poemo pri la vizito
al la foiro verŝajne estas maljunulo; ĉar...

... ke la okazintaĵoj, kies heroo estas iu
senharulo, okazis en tempoj, kiam la sen-
harulo posedis belan kaj plenan hararon,...

... ke per tiaj pratempaj komunikoj, kvankam
bonhumoraj, la „Bulteno“ perdes sian
aktualecon.

... ke la 6an de julio, inter la 20a kaj 22a,
kiam „La Rekta Vojo“ vizitis Sanktan An-
ĉon, ne pluvis.

... ke la tria boatekskurso de L.R.V. de-
nove iĝis sukceso, ankaŭ por la kaso de tiu
klubo.

... ke la organizinto de tiuj ekskursoj es-
peras aranĝi ilin ankoraŭ 22-foje kaj...

... ke oni lin tiam solene donos la epitet-
on: „La Heroo de la Boatekskursoj“.

... ke kvankam la boato jam frue revenis
en Antverpeno, la sekretariino, la kasistino
kaj la vicprezidanto estis la lastaj, kiuj ven-
is hejme, ĉar...

... ke ili perdis la rektan vojon; sed...

... ke la vicprezidantedzino savis la situa-
cion kaj pro tio ankaŭ „La Rektan Vojon“.

Aŭskultemulo.

Donacoj por subteni la Bulteno.

Beno Del Somero	fr. 2.—
Bruselano X.	„ 2.—
P. P.	„ 3.—

Ĉu vi jam scias ke ano de A.P.P.K. liveras
bonegajn belgajn karbojn?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64, Antwerpen

Presejo H. Van der Mast, Vlagstr., 9, Antw.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
PERSPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:

ADMINISTRACIO

Boomschesteeweg, 444 5a JARO
Aug. Sniedersstraat, 51 N° 3
SEPTEMBRO 1929

JARA ABONO BELGIUJO : 6.— Bfr. EKSTERLANDO : 2 Belg.

GRAVA ADMINISTRA ERARO.

Kaŭze de ŝanĝoj en la teĥnika laboro de la Bulteno, la presisto forgesis enpresi la adresojn de la redakto kaj de la administracio. Ni atentigas la gelegantojn ke nenia ŝanĝo alvenis al tiuj adresoj kaj ke nur la presisto estas kulpa al tiu grava administra eraro.

LA PLEJ BELA EL FLANDRUJO.

La plej bela el Flandrujo
estas mia karulin';
se vi estus ŝin vidinta
certe vi envius min.

Inda estas ŝi idino
de senmorta sia gent':
simpla laŭ la maniero
kaj sen fremda, falsa sent'.

Senmalica, senmakula
estas ŝia juna kor';
dum la tuta tag' ŝi kantas
kun infekta bonhumor'.

Ŝia klara, hela rido
sonas kvazaŭ perlofal';
ŝia buŝo estas tiel
ruĝa kiel la koral'.

Kvazaŭ karbunkoloj brilas
ŝia blua okulpar';
kvazaŭ nimbo la vizaĝon
serenigas la harar'.

Miajn kantojn murmuritajn
je humila, propra ton',
mi pro ŝia nura gloro
volas plekti nun je kron'.

Estas ŝi por mi oazo,
sur la tero la ĉiel';
sen ŝi ĉio iĝas vanta
kaj la viv' sen ĉarm', sen cel'.

JAN VAN SCHOOR.

AMO.

Viv' simila stratlanterno;
Lumo ĝia estas amo.
Vento blovas tra l'interno,
Etingiĝas tuj la flamo!

Karnasajo.

LA SAKPORTISTO.

(Skizo)

Arda suno forte brilas kaj ĝiaj varmegaj radioj traboras la vestojn. Kurbigata sub peza sako jen estas la sakportisto. La tolaĵo, kiun li havas sur la kapo, jam estas tute malseka de ŝvito. Grandaj ŝvitgutoj teren falas de la okulharoj; aliaj faras blankajn liniojn sur la nerazita vizaĝo. Dum li portas la pezajn, kun karboj plenigitajn sakojn, li de temp' al tempo kraĉas; longa radio da tabaksuko falas teren kaj disŝpruĉas je bruna makulo. Lia blua jako tute malsekiĝis kaj lia tuta korpo dissendas naŭzigan ŝvitodoron. Fortike li ŝvingas la sakon sur pezan veturilon. Liaj lipoj malsekiĝis. Subite li raŭke demandas: „Ĉu estas ankoraŭ io en la botelo?” Kapklino de kunlaboranto estas la sola respondo. La sakportisto prenas la botelon, alportas ĝin al sia buŝo kaj glutglute malplenigas ĝin ĝis la lasta guteto.

Obstine li rekomencas la laboregadon, ŝanĝante la maĉaĵon de temp' al tempo en la buŝo kaj forviŝante la ŝviton per la mano.

BENO DEL SOMERO.

KIEL LA AEROPLANO FUNKCIAS?

(daŭrigo)

Ie, inter la pilotseĝo kaj la motoro, estas imaga loko, nomata „centro de gravitado”, kie la tuta pezo de la aparato ŝajnas esti kuncentrigata. La tuta levebleco ankaŭ kuncentrigas ĉe punkto, nomata „centro de premo”, kies pozicio ŝanĝas kune kun tiu de la aeroplano, sed kiu, dum ebena flugado troviĝas rekte super la centro de gravitado, subtenas tie la pezon de la aviadilo kaj ekvilibrigas ĝin.

Por esti sub perfekta kontrolo, devas esti ebla al piloto movigi la flugmaŝinon dekstren, maldekstren, supren kaj malsupren. Tial li disponas pri specialaj direktilstangoj, kiuj certigas la funkciadon:

- a) de la vertikala direktilo, sin trovanta je la malantaŭa parto de l' maŝino kaj ebligante movojn dekstren kaj maldekstren;
- b) de serio da horizontalaj direktiloj, kies rolo estas levigi aŭ mallevigi la voston, por malsupren- aŭ suprenflugi.

Parto de ambaŭ direktiloj, vertikala kaj horizontala, estas senmova kaj funkcias kiel ŝvebigilo, same kiel la plumoj de saĝo.

Tamen, kiam aeroplano turnas, ne estas eble konservi la ekvilibron nur per la direktiloj. Same kiel biciklisto, turnante klinigas la biciklon internen, ankaŭ la aviadilo devas flankenklini. Tio okazas, movigante la flugiletojn (moveblaj sekcioj, konstruataj je la eksteraĵoj de la flugiloj). Se oni puŝas centran direktilstangon dekstren aŭ maldekstren, unu flugileto malsuprenklinas kaj pligrandigas la leveblecon je tiu flanko, dum la alia suprenklinas, tiel kaŭzante kontraŭan efikon. La neegala levkapablo je la eksteraĵoj de la flugiloj flankenklinigas la aeroplanon.

Per la aviadilo la homo ekkomencis venki la aeron; sed restas ankoraŭ multaj problemoj solvotaj kaj certe estos klera spirito kiu povas sin imagi kiel la aeroplano de la estonteco aspektos.

Laŭ angla teksto tradukis SYRRAH.

PROPAGANDU la urbajn vesperkursojn de ESPERANTO.

SKOLTA JAMBOREO. Aŭgusto 1929.

Apud Birkenhead, en Arrowse Park, okazis la internacia skolta jamboreo, t. e. ĉiu kvarjara internacia skolta kunveno, tendaro tutmonda, demonstracioj, ludoj, kampafroj, k. t. p.

Tiun ĉi jaron, pli ol kvindek mil skoltoj starigis pli ol 6000 tendojn. La sufiĉe granda parko kun la miloj da tendoj similis urbo, kun stratoj, kiel Pilgrimsway, Brussels road, Lionstreet, k. t. p. en kiuj estis telegrafejo, malsanulejo, teatro, ludejo, bankoficejo, turismoficejo, fotografejo, k. t. p.

La lingvo kiu estis plejmulte parolata estis la angla.

Tamen, miloj da flugfolioj konigis al la ĉeestantoj la esperantan lingvon. La skoltoj esperantistoj prizorgis la disdonadon. Tie sin renkontis Anglaj, Belgaj, Francaj, Hispanaj, Nederlandaj, Polaj kaj Portugalaj esperantistoj-skoltoj.

Al mia tendo estis vera procesio da personoj, kiuj volis informojn pri Esperanto

kaj tio sufiĉe pravas ke la farita propagando ne restis sen efiko. Speciala Jamborea Numero de la Skolta Esperantista Revuo „Skolta Heroldo” estas havebla ĉe J. Van den Eynde, Philomenastraat, 25, Antverpeno. (prezo: Froj. 2,25). Mi speciale atentigas la esperantistojn je la celo de tiu vendado: ebligi la esperantan propagandon inter la skoltoj el ĉiuj landoj, inter la juneco de hodiaŭ, estontaj homoj pace batalontaj.

„Antilopo”

Skolto Esperantisto.

GRUPA VIVO.

LA REKTA VOJO.

PROGRAMO POR LA MONATO SEPTEMBRO

Sabaton, la 7an: Vizito de la Hobokena Grupo. Diversaj amuzoj. Je la 8-a en la

Sidejo: CAFÉ AMICAL, Statiestraat, 17

Dimanĉon, la 8an: Ekskurso al Schooten.

Vizito al Ges. De Waegenaere. Oni kunvenu je la 9 1/2a al la Malnova Bariero. Kunportu bankostumon.

Lundon, la 9an: Sonorilarkoncerto de Gust Brees. Je la 8 3/4a. apud la Puto de Quinten Matsijs. Belega programo.

Sabaton, la 14an: Amuza vespero en la sidejo je la 8 1/2a. Aranĝoj por la venonta balo.

Dimanĉon, la 15an: Posttagmeza ekskurso al Boekenbergparko. Oni kunvenu je la 2-a. al la fina halte de la tramlinio 8, Deurne.

Lundon, la 16an: Lasta sonorilarkoncerto por la esperantistoj. Klasika programo. Je la 8 3/4a. ĉe la Puto de Quinten Matsijs.

Sabaton, la 21an: Kinematografvespero en la sidejo. je la 8-a. S-RO CROLS, riprezentanto de la Kodakaparatoj, parolos al ni pri la kolorigitaj filmoj kaj montros kelkajn al ni.

Sabaton, la 28an: Vizito al la Hobokena Grupo. Oni kunvenu je la Verda Placo je la 7 1/2a.

OKTOBRO.

Sabaton, la 5an: Parolado de S-ro Jan van Schoor, pri liaj poemoj. Je la 8 1/2a en la sidejo.

Sabaton, la 19an: **Luksa Malferma Balo** en la vasta salonego de Grand Café des Billards, Breydelstraat, je la 8a. **GENERALA ENIRPREZO: 3 Frjn.** Aĉetu de nun viajn kartojn ĉe la membroj de la Rekta Vojo.

Ekskurso al Hemixem, la 21an de Julio.

Estis la 3a posttagmeze kiam la unuaj partoprenintoj alvenis ĉe niaj gastemaj invitintoj, la gepatroj Keverijn. Baldaŭ 25 manĝemuloj el Antverpeno kaj Hobokeno plenigis la dometon en Hemixem. Inter ili ni notis la plej junan membron de la Rekta Vojo, kiu tiuokaze devis akcepti ludileton, tre zorge elektita de l'aliaj gemembroj. Post tiu malgranda solenaĵo ĉiu sin pretigis por malaperigi en la buŝon plejeble grandan kvanton da rizkaĉo. Nenie salonego aspektis pli lukse ol la manĝejo de la familio Keverijn. Juĝu mem, kara leganto: Verda herbotapiŝo anstataŭis la tro glitigan pargeton; plektobarilo taŭge reprezentis lukse tapetitajn murojn, kaj super ĉio la helblua ĉielo estis kvazaŭ altega, travidebla kupolo, kiu libere en- kaj el-, tra- kaj preterlasis venton kaj aeron.

Ni tamen ne longe havis la okazon ĉi ĉion pristudi ĉar jen jam alvenis la familio Keverijn kun grandaj ujoj enhavantaj la rizkaĉon, kaj la dudeko da gebabilemuloj iĝis silentema. Aŭdiĝis nur dentgrincado kaj kulerbatado, intermiksata kun fortegaj blovelspiroj. La flava, bongusta popolmanĝaĵo videble malaperis kaj ŝviligis la ventrojn. Ni tamen konfesu ke malgraŭ ĉiuj klopedoj de la ĉeestantoj, la familio Keverijn denove venkis en la terura batalo, ĉar jam la lasta manĝemulo ŝvitante forĵetis la batalilon, kiam nova kvanto da rizkaĉo estis alportata.

Intertempe, la gorĝoj sekiĝis, kaj tion denove plejbone komprenis niaj invitintoj, ĉar jen, kvazaŭ por alporti novan koloron al tiu jam riĉa farbintermiksaĵo, oni plenigis al ni glasojn kun freŝruĝa vino, preparita laŭ speciala recepto de la familio Keverijn. Re- kaj refoja plen- kaj malplenigo de la glasoj estis sufiĉa garantio pri la bongusteco de la trinkaĵo.

Post tio, la gedancemuloj longe kaj bone sin amuzis je la gajaj tonoj de piano, ĝis kiam fine la aŭtobuso ree kondukis al la urbo la lacajn gekavalirojn de la Verda Stel'.

HOKO.

Ekskurso al Heide, la 4an de Augusto.

La malnova Bariero refoje estis la muta atestanto de la kunveno de deko da Rekt-Vojanoj, kiuj de tie trame veturis al Cappellen. Malgraŭ la belega vetero la prezidanto jam eksentis neordinaran pluvon, ĉar... la plej juna R.V.-ano denove ĉeestis! De Cappellen oni faris belan ekskurson al Heide, kie, je tagmezo, ni alvenis, kaj atendis la alvenon de nia vicprezidanto kun edzino. Tiam ni eniris erikejon kaj trovinte taŭgan lokon, ni tie kampadis. Post bonfara ripozo en la ombro de pinarboj, la juna elemento kaŝludis en la tiucele kvazaŭ kreita loko. Ni rapide preteririu malgrandan akcidenton de ĉarma membrino, kiu post kuraca helpo de la prezidanto (kun la kunsento de ties edzino), ree kapablis ĝui la ĝeneralajn amuzojn de ekskurso.

Kiam vespere ni atendis la alvenon de la vagonaro por hejmenveturi, la vicprezidanto ekkaptis la ideon inviti nin trinki ĉe li glason da vino. Ĉiu plenmane profitis tiun inviton kaj en intima, gaja rondo la vesperhoroj tro rapide forflugis.

HOKO.

LA HOBOKENA GRUPO ESPERANTISTA.

VIZITO DE LA REKTA VOJO.

Je la 8 1/2a. dek-duo da Rekt-Vojanoj alvenis en nia sidejo kaj tuj post mallonga interkonatiĝo komika deklamado malfermis la pordon al ĝenerala gajeco. Grupe oni vizitis la Kirmeson de Moretusburg, kie unue oni atakis la karuselon. Lindberg, la konata Hobokenano, per Herkulesa forto tiel rapide turnigis la karuselon, ke al multaj gemembroj ekkomencis jam turni en la kapo.

Ĉu vi jam scias ke ano de A.P.P.K.
liveras bonegajn belgajn karbojn?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 — Antwerpen

Tial oni decidis serĉi aliajn amuzojn, inter kiuj ni ĉefe notu la pafekzercojn por viroj kaj virinoj.

Por fini tiun tre agrablan vesperon oni trinkis glason da freŝa biero kaj tiam, kante ante ni disiris ĉe la halto de la tramveturilo.

Ĝis la revido, Rekt-Vojanoj!

LINDBERGINO.

ONI FLUSTRAS.

... ke ankaŭ la Bultenon de Aŭgusto ne ricevis ĉiuj membroj de A.P.P.K.

... ke grupsekretari(in)oj kulpas pri tio.

... ke la vizito al Hoboken kaj la ekskursoj al Hemixem kaj Heide bone sukcesis sed..

... ke tiaj ekskursoj kaŭzas egan soifon;

... ke la partoprenintoj de la ekskurso al Hemixem pli trinkis de la vino, marko „Ke verijn”, ol manĝis de la rizkaĉo;

... ke post la ekskurso al Heide la ekskursantoj atakis la vinkelon de la vicprezidanto kaj..

... ke post tiu atako restis kvanto da malplenaj vinboteloj sur la batalkampo;

... ke la fraŭlinoj de L.R.V. ne ŝatas, ke la sinjoroj bilardludas dum ekskursoj;

... ke la kaŭzo de la mallongeco de tiu ĉi rubriko estas la libertempo de

Aŭskultemulo.

Esperantistoj Kantu !

Pli ol 100 zorge elektitaj kantoj diversnaciaj donos al vi la okazon agrabligi viajn kunvenojn kaj ekskursojn.

Kantaro Esperantista

kolektita de J. Karnas

Unua eldono de
NOVA BIBLIOTEKO

— Aperos la 1an de Oktobro. —

Ĝis tiu dato la enskribintoj ĝuos favorprezon de 5 Frj. Poste 6 Frj. Mendu tuj ĉe H. Van der Mast, Vlagstraat, 9 aŭ pagu al poŝtĉek-konto n^o 2098.52.

Presejo H. Van der Mast, Vlagstr. 9, Antw.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
VESPERSPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:

Boomsche Steenweg, 444

5-a Jaro

N° 4

ADMINISTRACIO

August Sniedersstraat, 51

OKTOBRO 1929

JARA ABONO

BELGUJO : 6.—Bfr.

EKSTERLANDO : 2 Belg.

Nia 5a Jarfesto.

Okaze de la 5^a datreveno de la fondo de A.P.P.K. kaj de la disdono de la diplomoj de la urbaj vesperkursoj de Esperanto ni havas la honoron inviti

ĈIUJN GESAMIDEANOJN

je la solena festvespero, kiu okazos

Sabaton, la 26^{an} de oktobro 1929

je la 8^a vespere en la festsalonego de la urba normala lernejo por instruistoj, Quellinstraat, 31, E. U.

Por A.P.P.K.

La Komitato

Lingvotalento

En „The Anglo-Belgian Times” de la 10a de Aŭgusto 1929, ni povas legi la sekvantan artikolon.

„Ĉu la malsameco de la lingvoj datumas de la Turo de Babel mi ne povas diri, sed ŝajnas sufiĉe certe ke ĉiuj provoj por krei nuntempe tutmondan lingvon estas kondamnitaj al malsukceso.

Malmultaj el niaj samlandanoj faris ian penon por fariĝi majstrojn de iu ajn lingvo krom sia propra. Niaj publikaj lernejoj instruas iujn malnovajn lingvojn, la Latinan kaj (kvankam nun, mi supozas, kun iu hezito) la grekan, kaj de la unua almenaŭ oni provas modernigi la prononcadon laŭ la nuna itala lingvo, kaj oni instruas iom laŭplaĉe la francan kaj la germanan lingvojn, sed ne, laŭ mi scias, iun alian lingvon.

Pro dolĉeco kaj belsoneco mi donus al la itala lingvo la unuan lokon, sed ĝia ĝenerala utileco estas praktike malmulta. La plejmultaj personoj konsentas ke nuntempe la plej utilaj lingvoj estas la angla kaj la franca, post kiuj mi lokigus la germanan kaj la hispanan lingvojn. Eksterlandanoj prave nomas la anglan lingvon *malfacila lingvo*, sed la nombro da tiuj kiuj deziras kaj provas lerni ĝin plialtiĝas ĉiutage kaj multaj el ili, precipe germanoj, sufiĉe rapide scipovas ĝin.

Rilate al la vortoj, la angla lingvo estas sendube tre riĉa lingvo. La franca lingvo, kontraŭe, estas certe malriĉa. Antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj oni kutime diris ke estis nur tri angloj kiu povis paroli france — la tiama Duko de Devonshire (kiu estis havinta francan vartistinon), la mortinta Lord Granville (la patro de nia nuna ambasadoro en Belgujo) kaj Sir Richard Wallace. Nun devas esti sufiĉe granda nombro kiu bone parolas ĝin, kaj tre granda nombro kiu komprenas kaj parolas ĝin, almenaŭ sufiĉe por kompreni sin.

Krom la danĝero fali en tiaj komunaj eraroj kiel “dividitaj infinitivoj”, kaj „finaj frazoj kun prepozicioj” oni devas konfesi ke la angla lingvo estas efektive malfacila lingvo. Estas tiam da malsimilaj dialektoj en la di-

versaj landoj kaj la elparolado de tiom da vortoj estas kontraŭ ilia skribado, ke perfekta kompreno estas preskaŭ nebla. Por tio kio koncernas la provincajn dialektojn, ni prenu ekzemple, la ordinarajn kamparanajn esprimojn en Essex kaj Yorkshire — la kutiman ŝanĝon de la litero S en Z en Sommersetshire kaj la forigon de la elspirado en Warwickshire.

Korcerne al la prononcado, de kiu eksterlandano oni povus atendi ke li scias ke tiaj bone konataj nomoj kiel Cholmondeley, Majoribanks kaj Beauchamp estas ekzemple prononcataj kiel Chumley, Marchbanks kaj Beecham. Aŭ prenu la nomojn de lokoj — Gloucester, Cirecester, Daventry, konataj kiel Gloster, Cisister kaj Daintree. Tiam diras la embarasita eksterlandano, kial Harwich devas esti Harrich (aŭ, pli verŝajne, Harridge) kaj Norwich, Norrich aŭ Norridge, estas Ipswich kun la W bone prononcata.

Kio koncernas ordinarajn vortojn estas neeble diri kiom da malsamaj prononcadoj estas kutime uzataj, kaj la emo de modernaj spertuloj estas renversi la prononcadojn kiujn oni ĉiam supozas ke ili estas firme fiksitaj.

Antaŭ nelonge mi estis solene riproĉata, ĉar mi parolis pri Byzatine kaj certigita ke devas esti Bissanten kaj ke la vorto myth devas esti korekte elparolata kiel mythe.

Paroli perfekte la anglan lingvon ŝajnas malespere kaj eĉ se oni imagas ke oni povas skribi ĝin, oni estas ofte kruele seniluziĝata pro la kruela liberegeco de la *presistoj*

J. M. C.
(tradukita el la angla lingvo)

Ni varme rekomendas la *supran artikolon* al la konsidero de tiuj, kiuj dubas ankoraŭ pri la neceseco kaj la taŭgeco de Esperanto kaj kiuj kredas ankoraŭ en la ebleco de la angla kaj la franca lingvoj kiel internacia helplingvo. Se angloj mem tiel prijuĝas sian lingvon, ni facile povas imagi kiel ĝi aspektas al neangloj.

PROPAGANDU LA URBAJN VESPER-
KURSOJN DE ESPERANTO.

La malfermo de la internacia Esperanto-Muzeo en Wien

La malfermo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien okazis kun la Antaŭkongreso al la 21a Universala Kongreso en la sama urbo. La prezidanto de la Aŭstria Respubliko, S-ro Miklās, akceptis aŭdienco la eminentulojn de la esperantistoj en la Kanceliera Palaco. La inaŭguro de la muzeo okazis la 1-an de aŭgusto en ĉeesto de la Prezidanto kaj de aliaj eminentuloj. La Prezidanto mem tiuokaze faris propagandan paroladon por Esperanto.

Laŭ „Sennaciulo” n° 258

La 21a Universala Kongreso de Esperanto en Budapest.

La 21a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Budapest de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto. En ĝi partoprenis pli ol 1200 personoj. Dum la malferma kunsido salutis la kongreson je la nomo de la Hungara registaro S-ro ministra konsilanto barono Kazy. Dimanĉon, la 4an, okazis la inaŭguro de la standardo de Hungara Esperanto Societo kaj la malkovro de marmora tabulo je la memoro de grafo Stefano Széchenyi, kiu pledis por kompilado de Internacia Lingvo en la Hungara Scienca Akademio la 27an de novembro 1842. Vespere, dum la internacia kostumbalo, Estona fraŭlino estis elektita kiel „Miss Esperanto”. La unua laborkunsido, lundon la 5an, estis malbone vizitata. S-ro Krysta referis pri la elparolado de Esperanto. En tiu ĉi tago okazis multaj fakkunsidoj kaj ceremonio ĉe la tombo de prelato Giesswein. Ĉe la dua laborkunsido, merkredon la 7-an, oni aŭdis treege interesan kaj tre utilan referaĵon de S-ro Kreuz pri la „Esperanto-tradukado en internaciaj konferencoj”. La tria laborkunsido estis ankaŭ tre malmulte vizitata. En tiu kunsido oni pritraktis diversajn aferojn kaj oni transdonis al S-ro Warden honoran medalon kiel simbolon de estimo kaj amo de la tuta esperantistaro por lia granda laboro farita por nia afero. I.C.K. decidis

krom li, honori per la medalo ankaŭ S-ojn generalon Sebert, prof. Cart kaj D-ron Privat. La ferma kunsido okazis vendredon, la 9an de aŭgusto. S-ro D-ro Feliks Zamenhof pledis por la ĉiujara okazigo de la universalaj kongresoj de Esperanto. La kongreso finiĝis ne fiksinte la lokon de la venonta kongreso, ĉar neniu invito estis farita.

Laŭ „Heroldo de Esperanto”

La 9a S.A.T. Kongreso.

La 9a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis en Leipzig de la 4a ĝis la 10a de aŭgusto. Al tiu kongreso anoncis sin 1102 gesamideanoj el 29 landoj, sed efektive ĉeestis la kongreson 662 gesamideanoj el 22 landoj. Krom diversaj fakkunsidoj estrar- kaj komitatkunsidoj okazis kvin ĝeneralaj laborkunsidoj dum kiuj oni forte kritikis la direkcion de S.A.T. La rezulto de la laboroj estis la renovigo de la difino de la rolo de S.A.T. (jam farita dum la 8a S.A.T.-Kongreso en Stockholm): S.A.T. ne estas politika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo precipe okupata per la utiligado de Esperanto. Konsiderante ke la Direkcio kaj la aliaj gvidantaj organoj senlace kaj sindoneme laboradis ĉiam por la bono de la Asocio kaj ke la eblaj iliaj eraroj povis okazi ne pro la malbona intenco de la Direkcio, la Kongreso esprimis sian fidon al ĉiuj gvidantaj organoj kaj remandatis ilin daŭrigi la laboron kun speciala atento pri neceso konservi senpartiecon kaj unuecon de S.A.T.

Le plena protokolaro de la kongreso aperis en „Sennaciulo” de la 29a de aŭgusto kaj estas aparte havebla ĉe la administranto: R. Lerchner, Rolmstrasse, 1, Leipzig, O 27. Germanujo, kontraŭ alsendo de unu internacia respondkuponon.

La Urbaj Vesperkursoj de Esperanto.

La urbaj vesperkursoj de Esperanto rekomenciĝis la 30an de septembro. Ili okazas, kiel kutime, en la urbaj lernejoj de Louiza straat, Pierenbergstraat kaj Van Maerlant-

straat. Instigu viajn konatulojn ĉeesti tiujn ĉi kursojn, kiuj estas la solaj oficialaj kaj la efikaj. Nur tiamaniere vi helpos al la rapida oficialigo de Esperanto.

Grupa Vivo.

LA REKTA VOJO.

Programo por la monato Oktobro

Sabaton, la 5an. Paroladon de Jan Van Schoor, je la 8 1/2a en la sidejo: Café Amical, Statiestraat.

Sabaton, la 12an. Kinematografvespero en la sidejo. S-ro Crols, riprezentanto de la Kodakaparatoj por Antverpeno pritraktos la programon anoncitan por la 21 de septembro, sed kiu devis anstataŭata kaŭze de lia libertempo. Li montros al ni kolorigitajn filmojn kaj parolos kielmaniere ili funkcias.

... Sabaton, la 19an de Oktobro. **Luksa Malferma Balo** en Grand Café des Billards, Breydelstraat. Enirprezo: 3.00 fr. Kartoj estas haveblaj ĉe la membroj.

Sabaton, 26an Jarfesto de A.P.P.K.

Sabaton, la 2an de novembro. Amuza vespero en la sidejo.

Sabaton, la 9an. Parolado de S-ro Lodema „600 kilometroj tra Nederlando per Bciklo”. Ĉiu Esperantisto estas bonvena.

ONI FLUSTRAS . . .

... ke vizito al la somerrestejo de S-ro Libot en Sankta Anjo dumvespere estas mortdanĝera entrepreno ;

... ke la Rektvojanoj neniam estus trovintaj la dometon se ili konstante estus sekvintaj la rektan vojon ;

... ke ili tie pasigis vesperon similan al la belaj tropikaj vesperoj ;

... ke en „La Rekta Vojo” Esperanto servas kiel edz-peranto, ĉar...

... ke dum kvarjara ekzistado jam 6 membroj formis 3 feliĉajn parojn kaj...

... ke baldaŭ 4 gemembroj sekvos tiun bonan ekzemplon ;

... ke la kunveno de la 7a septembro bone sukcesis dank' al neĉeesto de la ina parto de la membraro ;

... ke la elspezoj por la baloj pli kaj pli

grandiĝas ;

... ke la dua kaj tria balo ne okazos se la defcito de la unua balo estos tro granda ;

... ke la ĉarmulinoj de L.R.V. jam nun petegas al la estraro por havi la honoron ornami la sinjorojn per Esperanto-floreto dum la balo ;

... ke la kasistino dum sia libertempo vizitis Parizon ;

... ke en la daŭro de du monatoj malaperis 4000 virinoj sen postesigno, sed...

... ke nia kasistino feliĉe revenis ;

... ke la vicprezidanto la 9an de novembro parolados, kaj ...

... ke la temo de la parolado estos : 600 Km. tra Nederlando per biciklo.

Aŭskultemulo.

GRATULOJ.

Edziĝo.

La 21an de septembro geedziĝis sinjoro John Monstrey kaj fraŭlino Maria Lodema, membroj de „La Rekta Vojo”. Al la juna paro A.P.P.K. prezentas la plej sincerajn bondezirojn.

Naskiĝo.

Al Ges. Van Kerckhoven-Adam naskiĝis, la 17an de aŭgusto, dua fileto, nomata Floris. A.P.P.K. sincere gratulas la feliĉajn gepatrojn.

Donacoj por subteni la Bultenon.

Lindberg	Fr. 5.—
Hobokenano	„ 3.—
S-ro P. de Portemont, Geeraardsb.	„ 7.—
S-ro C. Huysmans, Brussel	„ 7.—

Ĉu vi jam scias ke membro de

A.P.P.K. liveras bonegajn karboj ?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen

BULTENO

MONATA EL DONO DE LA

ANTVERPENAJ ESPERANTO
PROPAGANDA KOMITATO

REDAKTEJO:

ADMINISTRACIO

Boomsche Steenweg, 444

August Sniedersstraat, 51

5-a Jaro

N^o 5

NOVEMBRO 1929

JARA ABONO

BELGIUJO: 6 Fr.

EKSTERLANDO: 2 Belg.

A.P.P.K. Festis!

La 26-a de oktobro estis kaj restos memorinda tago en la historio de nia komitato. Ne sole, okaze de la disdono de la diplomoj al la premiitaj gelernintoj de la urbaj oficialaj vesperkursoj, sed ankaŭ de la kvina datreveno de sia ŝtariĝo, A.P.P.K. oferis al la gediplomitoj kaj al la gembrioj de la aliĝintaj grupoj artkoncerton, pri kies artvaloro atestas la bedaŭro de la ĉeestantaro, ĉar ĝi tro frue finiĝis.

La urbeŝtaro, pere de S^{ro} la Skabeno pri Instruado disponigis al A.P.P.K. ne nur la salonegon de la urba normala lernejo, sed ĝin ornamigis per belegaj krizantemoj kaj alkreskaj palmoj. La flagoj de la diversaj grupoj kompletigis kaj esperantigis la ornamadon.

Je la 8 1/2 h. pli ol ducent personoj, inter kiuj multaj neesperantistoj, plenigis la salonegon.

S^{ro} la Skabeno pri Instruado, kiu firme

intencis ĉeesti la solenaĵon, letere senkulpigis sin, estante lastmomente malhelpita veni, sed delegis S^{ron} Bruers, inspektoron de la oficialaj lernejoj, por anstataŭi lin.

La prezidanto, per kelkaj afablaj vortoj, bonvenigis S^{ron} la lernejinspektoron kaj la fremdajn samideanojn, kaj malfermis la artan parton de la ceremonio.

Kion diri pri la koncerto? La nomoj de la bone konataj geartistoj, F^{ino} A. Swalf, kantistino, S^{ro} Strijmans, violonisto jam esperigis al ni ĝuegon, sed la koncerto superis nian esperon.

La koncerto malfermiĝis per la „Himno Esperantista” ludita de la trio: S^{ro} A. Goudsmit, violonisto, F^{ino} Carvalho, pianistino, S^{ro} Weening, violonĉelisto, kiuj ankaŭ perfekte ludis **Hispanaj dancoj** de Moskowski.

La dua numero konsistis el: a) **Ĉagreno**; b) **Dormetkanteto**, ambaŭ verkitaj de A. Meulemans, c) **Kanto** de B. Zweers, bele-

kantitaj de F^{ino} A. Swalf, filino de nia simpatia samideano, organizinto de la arta parto de la festo. Jam multaj inter ni havis la plezuron admiri la belegan voĉon de tiu artkantistino, pere de la radiodissendo, sed la mirinde bela kantado kaj pureco de ŝia voĉo ĉiujn ravegis.

La sonato de Hændel, ludita de S^{ro} Strijmans kaj F^{ino} Peeters, du virtuozaĵoj bone konataj en la artistaj rondoj, havigis al si grandan sukceson.

La al la artistinoj oferitaj floroj esprimis la dankon de la Komitato; ĉiuj artistoj, plej seninterese, oferdonis sian talenton.

Post la unua parto de la koncerto okazis parolado de la prezidanto, S^{ro} J. Jacobs, kiu unue flandralingve klarigis al la neesperantista ĉeestantaro la celon de la festo. Li petis S^{ron} la lernejinspektoron Bruers ke li esprimu la dankon de la Komitato al S^{ro} la Skabeno pro la granda intereso kaj la oficialigo de la festo, disponigante al ni la belegan salomon kaj delegante S^{ron} la inspektoron.

Poste li alparolis la geesperantistojn en ilia lingvo kaj rememorigis al ili la celon de la fondiĝo de A. P. P. K. : t. e.

1. Enkonduko de Esperanto en la oficialajn lernejojn. Tiu celo parte estas atingita, ĉar Esperanto estas enkondukita en la ofic. vesperk;

2. konstanta propagando por tiu celo;

3. propagandi por Esperanto en la flandra parto de la lando, eldonante skriban kurson, propagando pri kies rezultato ni povas fierigi.

Poste S^{ro} la inspektoro disdonis la diplomojn kaj afable gratulis ĉiun diplomiton.

Kiel memoraĵon al tiu bela festo kiu grandparte estis por ilia honoro, la prezidanto, en la nomo de la Komitato, donis al ĉiu diplomakirinto ĉu vortaron ĉu "Amo kaj Poezio(n)", de Jan Van Schoor. Fervora esperantisto, S^{ro} Lodema, por la sama celo donacis kelkajn literaturajn libretojn. Post tiu solenaĵo daŭrigis la artkoncerto per

a) **La Tosca** de Puccini. **Serenado** de R. Strauss.

F^{ino} A. Swalf, ĉe la piano F^{ino} Peeters.

b) **De printempa Mateno** de L. Boulanger, **Ĉasado** de Mondonville.

S^{ro} Strijmans kaj F^{ino} Peeters.

c) **Melodio** de Rubinstein; **Sopiras mia koro** de W. A. Mozart.

Trio; S^{ro} Goudsmit, F^{ino} Carvalho kaj S^{ro} Duzen.

Varma entuziasmo regis inter la aŭdantaro, kiu ne sufiĉe povis aplaŭdi la belan kantadon kaj la fingroviglecon de ĉiuj artistoj. Sed la sukceso atingis sian plej altan gradon kiam F^{ino} Swalf ekkantis plej voĉpure kaj kareseme la Serenedo'n de R. Strauss esperantlingve.

Ni ne preterlasu gratulintan samideanon Karnas Juul, kiu tiel lerte esperantigis tiun belan kanton.

Per la ludado kaj la kantado de "La Espero" finis tiu memorinda festo.

Dum la solenaĵo alvenis telegramo de la samideana grupo "Al Triumfo", el S^{ta} Nikolao, por gratuli profesorojn kaj lernintojn.

Ankaŭ alvenis gratulletero de la samideana grupo "Germana Esperanto-Asocio; — Loka grupo Nuernberg...", kun kies anaro kelkaj kongresgepartoprenintoj de la XXIIa interkonatiĝis kaj amikiĝis, kaj al kies prezidanto, S^{ro} Pilhofer, subskribinto de la letero, ili ŝuldas plejgrandan dankon pro lia helpemo.

Koregan dankon al tiuj samideanoj!

Je la 10 1/2 la festo finiĝis, kaj ĉiuj disigis esperante ke tiaj belaj festoj, kiuj ne nur interfratigas la esperantistojn, sed ankaŭ konigas al la eksterstarantoj ke Esperanto ne malakordiĝas kun la arto, — kontraŭe, — ankoraŭ estas organizotaj.

A.

La skriba kurso „APPKO”.

Kiam A. P. P. K. sendis en la mondon sian skriban kurson ĉiu estis certa pri ĝia taŭgeco, sed ĉiu estis scivolema scii ĉu efektive ĝi ebligis la lernantojn atingi la esperita rezulton, ĉu per ĝi la lernantojn efektive akiris sufiĉajn konojn por skribe esprimi sin en Esperanto. Nun kiam la kurso finiĝis kaj leteroj de lernan-

toj atingas nin, ne plu povas esti dubo; la kurso Appko donis tiajn brilajn rezultatojn ke tiuj ĉi estas preskaŭ nekredeblaj kaj mirigis la plej pesimistajn. Kiel pruvon de tio ni permesas al ni publikigi la sekvantajn leterojn, petante de la sendinto senkulpigon pro tio ke eble ni misuzas nian diskreton. Notu bone ke neniun literon ni ŝanĝis al ili.

Tre estimata sinjoro,

Estante lernantino de via skriba kurso laŭ la metodo „Appko”, mi demandas al vi adreson de korespondanto. Per la korespondado mi ne nur forgesos la mondhelplingvon, sed mi perfektigis en Esperanto; ĉar mi estas telegrafistino kaj violonistino, havas la katolikan opinion, mi preferas interrilatiĝi kun tiu persono, kiu interesiĝas pri sama temo kaj adoras la solan Dion.

Atendante vian respondon, kara sinjoro, mi dankas vin antaŭe kaj prezentas al vi miajn sincerajn salutojn.

N. B. Ĉi kune mi sendas poŝtmarkon por la respondo.

* * *

Ni estis tiom mirigita pri la senerara letero kaj pri ĝia bonstileco ke en nia respondo ni petis pliajn klarigojn pri la maniero laŭ kiu ŝi tiel perfekte lernis Esperanton. Kaj jen la respondo.

Tre estimata sinjoro,

Mi bone ricevis la adresojn de samideanoj, kaj kore dankas vin pro via bonvoleco. Mi rapide faris mian elekton kaj jam skribis al la korespondantoj.

Tre senteme al via gratulo mi sciigas al vi ke nur per la kurso „Appko” mi lernis Esperanton, eĉ neniam antaŭe mi havis ideon de la internacia helplingvo. Precize mi sekvis viajn saĝajn konsilojn en la komenco de la lernado. Ne do flatu min; mi nur estas komencanto, sed penos ĉerpi el via lernado tiom da profito kiom mi povas. Jes, laŭ mi, oni devas meriti sian insignon. Dankon, milfoje dankon, kara sinjoro, pro via agrabla preskaŭ senkosta kaj perfekta kurso; mi

opinius min feliĉege, se mi iam povus fari rezervon al vi.

Akceptu, tre estimata sinjoro, miajn plej sincerajn salutojn.

* * *

La plej korajn gratulojn kaj plej grandajn laŭdojn A. P. P. K. sendas al la kuraĝa lernantino, kiu tiom pruvis la grandan valoron de la kurso „Appko”. Pli belan rezultaton ne estas atingebla per memlernado.

N. B. - Ni atentigas niajn gelegantojn ke nova skriba kurso laŭ la metodo „Appko” komenciĝos tiun ĉi monaton. Enskriboj oni de nun sendu al:

S-ro J. Jacobs, Boomsche steenweg, 444, Antwerpen. (poŝtĉekkonto 230.115).

La prezo de plena kurso (25 lecionoj) estas 20 frankoj.

A.P.P.K.

GRUPA VIVO. (*)

La 1-an de septembro la Hobokenaj Esperantistoj vizitis la Sanktan Nikolaaan Grupon „Al Triumfo.

Ege varme iĝos! Jen la diro, kiu resonadis dimanĉon, la 1-an de septembro, el la buŝo de ĉiuj „Hobokenaj Esperantistoj”, kiam ili vidis ke la kara septembra suno volis kunhelpi al la sukceso de ilia ekskurso. Multaj bonhumoraj gesamideanoj estis allogitaj al la Kiosko por kune ekskursi. Ĝis la lasta minuto ni atendis iun, kiu promesis atendi ĉe la stacidomo. Sed bedaŭrinde la promesinto ne estis videbla. Ĉu eble pro la noktapatio vi pli ŝatis vian liton? Interbabilante, kantante, ĝuante la freŝan aeron, ni veturis laŭlonge de belaj kampoj kaj arbaretoj.

Je tagmezo ni alvenis. La plimulto el ni estis kunportintaj buŝprovizon. Tuj kiam ni estis elirintaj la stacidomon, ni honorigis konatan kafejstron per nia vizito, ĉar niaj stomakoj malkontentiĝis kaj esprimis tiun malkontentecon per laŭta klakado. La manĝaĵoj kunportitaj tuj estis formanĝita de la Hobokenanoj kiuj preskaŭ mortis pro malsato...

Post refreŝiĝo kaj refortiĝo la afabla se-

kretariino de la grupo „La Verda Rado” venis kaj kondukis nin al la sidejo. Post mallonga ripozo, ni kune kun la geamikoj el S' Niklaas kaj Aalst, kiuj speciale estis venintaj, faris promenadon tra la urbo. S-ro Van Ghendt, la afabla sekretario de la grupo „Al Triumfo”, gvidis la aron da geamikoj. Li montris la plej interesajn vidindaĵojn kaj mallonge rakontis la historion de ĉiuj el ili.

Poste ni vizitis „Flandran Kermeson”, organizitan en korto de iu lernejo. Diversajn petolaĵojn oni faris. Starante antaŭ budo kelkaj anoj aĉetis bileton, nesciante kio okazos. La tombolo jam estis finita. Kiel surprizon S-ro Van Ghendt ricevis kuniklidon. Feliĉa gajnanto! Nesciante kiamaniĉo kunporti sian trezoron, li finfine envolvis ĝin en amaso da papero. La tempo ege rapide forflugas, kiam oni sin amuzas!

Vesperigis kiam ni revenis al la stacidomo. Dumvoje ni renkontis la s-ron prezidanton de la S-ta Nikolaa grupo, kiu petis, antaŭ ol forveturi, malplenigi glason da biero.

S-ro Van Ghendt ankoraŭ ĉiam portis la beston kiel veran suĉinfanon. Inter la profitoj li estis, ĉu ne, ĉar je iu momento li ricevis trinkmonon, kaj ni ĉiuj povis ĝui de la bonodoro. Ĉe la stacidomo nia prezidanto ankoraŭ diris kelkajn dankvortojn al la Sanktaj Nikolaaj gesamidanoj pro ilia afableco. Esperante kiel eble plej baldaŭ revidi ilin en nia mezo, ni adiaŭis.

B. Somers

(*) Pro manko de loko ni devis prokrasti la aperon de aliaj raportoj.

ONI FLUSTRAS...

... ke la oktobra numero de „Flandra Esperantisto”, havas riĉan kaj interesigan enhavon;

... ke ĝi pli regule aperas ol “Belga Esperantisto”, kaj... “Bulteno”, :

... ke la Esperantistaro estonte ne plu povos ignori la ekziston de Flandraj Esperantistoj;

... ke la antaŭsignoj de tiu kreskanta potenco jam estis rimarkeblaj dum la festo de

“La Pioniroj”, en Aalst, la 13an de oktobro, ĉar....

... ke preskaŭ ĉiu Pioniro aĉetis la F. E. ;

... ke la redaktoro de tiu ĉi monata revuo rikoltis pli longan kaj laŭtan aplaudon ol la sinjoro, je kies honoro la festo en Aalst okazis;

... ke la bankedo estis tia, kia oni povas atendi de bankedo de 20 frankoj;

... ke oni dum la bankedo senpage disdonis la “Bultenon”, kaj ke precipe la 4a paĝo altiris la atenton, ĉar ;

... ke tie troviĝas la rubriko “Oni flustras” ;

... ke la vicprezidanto de “La Rekta Vojoj”, volis kredigi al la bankedistoj ke lia aĝo estas 94 jaroj ;

... ke tiu sama sinjoro en la vagonaro de Aalst al Antwerpen enamiĝis je belulino de 21.... semajnoj ;

... ke la brilaj koloroj de la kolorfilmo, montrita en la kunveno de L. R. V. preskaŭ blindigis ĉiujn ĉeestantojn ;

... ke L. R. V. tre verŝajne denove devas serĉi alian kunvenejon kaj ;

... ke ĝi pro tio baldaŭ akiras la epiteton : migranta klubo ;

... ke la kunvokiloj de A. P. P. K. ĉiam detale kaj klare anoncas la tagordon.

... ke la Rektvojoj plendas pri la fakto

... ke la fondintoj de ilia klubo ne vizitas la kunvenojn kaj...

... ke ilia granda propaganda laboro en A. P. P. K. estas senkulpigo, sed,

... ke ilia daŭra forestado de kunvenoj kaj ekskursoj malrapide mortigos ilian propran kreitaĵon.

Aŭskultemulo.

Ĉu vi jam scias ke membro de
A.P.P.K. liveras bonegajn karbojn ?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENAJ
PROPAGANDA



PORESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:

Boomsche Steenweg, 444

ADMINISTRACIO

August Sniederstraat, 51

5-a Jaro

N° 6

DECEMBRO 1929

JARA ABONO:

BELGUJO : 6 Bfr.

EKSTERLANDO : 2 Belg.

LINGVOJ EN LA LERNEJO

La programoj de niaj lernejoj, tiom unuagradaj kiom mezgradaj, estas pridis-kutataj en rilato kun la estanta reorganiz-ado de nia eduka sistemo. La "School-
master,, (Intruisto) publikigis diversajn kla-
rigajn artikolojn pri tiu afero, kaj ĝia nu-
mero de la 24-a de oktobro pritraktis la
instruadon de lingvoj. Oni ĝenerale kon-
sentas ke la instruado de lingvo aŭ
lingvoj en ĉiuj lernejoj estas dezirinda :
la malfacilaĵo estas lokigi ilin en la jam
pezan programon. La plialtigo de la lerne-
ja aĝo donas ian helpon laŭ tiu direkto,
kaj la elekto de lingvo postulas tujan aten-
ton. Tiu kiu skribas en la "Schoolmaster,,
speciale atentis la eblecon enkonduki en
la lernejon internacian lingvon.

"La kunigo de nacioj per telegrafo, te-
lefono, radio, per plirapidigita transporto,
per internaciaj ligoj kaj konferencoj, kreas
nekontraŭstareblan peton pri ia formo

de komuna lingvo. Ĉu tiu ĉi komuna ling-
vo estos la lingvo de iu definitiva nacio, aŭ
nova internacia lingvo kiel Esperanto,
oni ne ankoraŭ povas antaŭdiri. Dume la
Anglaj lernejoj staras tre malproksime
malantaŭ tiuj de multaj Eŭropaj naciojn en
la instruado de modernaj lingvoj...

La raporto de Hadow rekomendas
fremdan lingvon en la fakoj de ĉiuj post-
unuagradaj lernejoj ; "tia kurso stimulos
spiritajn agemecojn kaj plilarĝigos la ri-
gardon de la lernanto, kaj estos praktike
utila en komerco..."

Kiun modernan lingvon oni elektos ? ...
En la ekzamenoj de la Mezgradaj Lerne-
joj de julio 1928, la nombro de tiuj kiuj fa-
ris ekzamenon pri dua lingvo estis : Franca
54.273 ; Latina 23558 ; Germana 3837 ;
Hispana 719. Ĉiuj klasoj de homoj nun ĝu-
as kontinentajn libertempajn kaj la Franca
lingvo estas sendube la plej utila sur la
Kontinento. La flugfolio de la Ministerio
de Instruado pri la pozicio de la Germana
lingvo en la subvenciataj mezgradaj lernej-

oj bedaŭras la komparan malatenton de tiu ĉi lingvo. La Hispana lingvo fariĝos pli kaj pli utila, ĉar la Sud-Amerikana komercaj merkatoj pli malfermiĝas. Aliaj modernaj lingvoj havas komercajn uzojn kaj eblecojn, kaj rilate ĉi la elekton, oni verŝajne elektos post atenta konsidero de la komerca valoro de la lingvoj; estas eble ke instrupovo povus esti la decida faktoro.

Oni jam faris multajn provojn por starigi internacian lingvon, kaj estas evidente ke tia lingvo, se ĝi estus ĝenerale instruata, ni diru, en la tridek kvin landoj de la Ligo de Nacioj, havus grandegan influon. Tiuj kiuj kredas en internacia lingvo kaj provis la instruadon de Esperanto en unuagrada lernejoj, laŭte laŭdas la simplecon kaj ĝian ĉarmon por la lernantoj."

Al ni ŝajnas ke almenaŭ estas pridiskutinde ĉu estas vere utile instrui nacian lingvon kiel la Franca en la lernejoj dum du, tri aŭ kvar jaroj, kiam eble oni povus fari pli bone instruante internacian lingvon, almenaŭ rilate la tempon. Multaj el ni lernis la Francan lingvon en la lernejo dum kelkaj jaroj kaj foriris kun neplena kono, kiun ni trovis poste malmulte aŭ tute ne utila en Francujo. Se la lernado de lingvo en lernejo volas esti utila, oni devas kompletigi ĝin per plua studado post kiam oni forlasis la lernejon. Sed en la sama tempo, aŭ pli bone, en multe pli mallonga tempo, oni povas akiri en la lernejo plenan konon de Esperanto; psikologie grava afero. La profito ne ĉesas tie: oni almontris en eksperimentoj faritaj en lernejoj, ke la tempo dediĉita al Esperanto antaŭ ol komenci nacian lingvon estas efektive ŝparado de tempo, ĉar la studentoj kiuj studadis la Esperantan kaj Francan lingvojn, ĉiun dum unu jaro, ĝenerale faras pli bonan ekzamenon en la Franca lingvo ol tiuj kiuj dediĉis du jarojn nur al la Franca lingvo. Per tiu ĉi aranĝo la studento havus bonan konon de Esperanto, kio kondukus lin tra la mondo, kune kun la neplena kono de Franca lingvo, kiun li nuntempe akiras. Lia spirita horizonto plilargiĝus multe pli ol tio estas iel ebla (ekzemple, post la unuaj du monatoj

de studado li povus korespondi kun studentoj el multaj landoj): kaj li havus tiom bonan ekzercadon en klara pensado kiom tio estas eble doni en ordinara lernejo. Mallonge, Esperanto povas doni grandan profiton al nia eduka sistemo, kaj ni gratulas la "Schoolmaster", pro ĝia juĝo.

Tradukita el "International Language", Dec. 1929.

J. J.

En Bulgario la laborista esperantomovado plifortiĝas.

Ankaŭ en la blanka lando Bulgario finfine la laboristaj esperantistoj sukcesis eldoni sian propran presorganon „Balkana Laboristo". La bulgaraj laborist-esperantistoj per tiu paŝo sekvis la gekamaradojn en jam multaj aliaj landoj. Ni nur citu la fakton, ke antaŭ nelonge ankaŭ la japanaj laborist-esperantistoj eldonis propran organon "Labespo.", (kiu ankoraŭ estas multobligati, sed tiu ĉi ĵurnalo tamen tre impresas kaj belaspektas).

"Balkana Laboristo.", estas monata revuo; la unua numero aperis jam 8 paĝa, kaj oni esperas povi eldoni sekvantan numeron jam 16 paĝa. Abonprezo por tiu ĉi nova batalilo de proletaj esperantistoj en blanka lando estas por eksterlando 2 sv. fr. Adreso estas: „Balkana Laboristo", pl. "Pozitano.", 1, Sofia-Bulgario. La revuo nur aperas de post januaro 1929, kaj ni nur povas rekomendi abonon.

Esperanto-Servo de SAT.

ĈE LA KNABSKOLTOJ.

La 31an de julio la duko de Connaught malfermis en Arrow Park, Birkenhead (Anglujo) la grandan jamboreon, kunvenintan okaze de la 21a datreveno de la kreado de la skolta movado. Partoprenis en tiu ĉi kunveno ĉirkaŭ 50.000 junuloj el 27 nacioj.

La duko de Connaught faris per kelkaj vortoj la historion de la asocio, kiu komenciĝis tre modeste antaŭ dudek unu jaroj kaj kiu kalkulas nuntempe pli

ol du milionojn da knaboj apartenantaj al ĉiuj rasoj kaj al ĉiuj religioj. Dum pli ol unu horo la skoltoj marŝadis preter la duko.

La 1-an de aŭgusto alvenis en Birkenhead la princo de Kimrujo, vestita per la uniformo de grandĉefskolto de Kimrujo. Li estis entuziasme ricevita de la skoltoj, kiuj transdonis al li ĉekon da 1.225.000 fr. por krei fondon, kiu servos por alkuraĝigi la internacian amikecon inter la junularo.

TRINKKANTO.

Servu, servu la bieron tuj, juk-he!
 Servu, servu la bieron tuj!
 Ĉu ekzistas la bieroj
 Nur por plaĉi al anseroj?
 Servu, servu la bieron tuj!

Trinku, trinku la bieron tuj, juk-he!
 Trinku, trinku la bieron tuj!
 Lakton trinku suĉinfanoj;
 Sed bieron „Rekt-Vojanoj“!
 Trinku, trinku la bieron tuj!

Laŭ la Germana kanto: Bier her
 — Juul Karnas.

Universala Stenografio.

La konata stenografisciencisto Felix de Kunovski en Potsdam sukcesis post jardeka laboro konstrui mallongskribon kiu sen aliigo de la sonosignoj estas uzebla por ĉiuj lingvoj kaj kiu tial nomiĝas Internacianalstenografio. S-ro de Kunovski jam pretigis gvidilojn por 22 lingvoj, el kiuj ĝis nun aperis 15, nome por la esperanta, germana, angla, franca, hispana, itala, pola, rusa, sveda, dana, nederlanda, portugala, rumana, greka kaj latina lingvoj. Baldaŭ aperos la gvidiloj por la serba, bulgara, ĉeĥa, ukraina, hungara, kaj japana lingvoj. Pro la internacia disvastigo, ĉiuj gvidiloj estas verkitaj en la internacia helplingvo Esperanto. En la nunaj tagoj aperis germanlingva instruilo por la “germana malongskribo” de la Internacianalstenografio. La “Regna Asocio por Nacionalstenografio.. Duisburg. Friedenstrasse 79. batalas por la disvastigo de la Internacianalstenografio.

Irlanda Spritajo.

KOMPLETA.

La Irlandano Bill, patro de sep infanoj, estis veturinta Londonon por serĉi laboron. En la hotelo, kie li volis trapasi la nokton, la servisto montris al la alveninto ĉambron; dirante: Jen, via dormĉambro, sed ĝi estas parte okupata de alia familio: zorgu do ke vi enlitiĝu antaŭ ol ili alvenos.

Bill senresponde eniris, atenteme ŝlosis la pordon, kaj ridetante ensaltis la liton. Apenaŭ dek minutojn poste, la aliaj gastoj frapis sur la pordon.

Nenia respondo.

Pli forta frapado.

— „Kompleta“, fine ekkriis Bill.

— „Kiom da personoj estas en la ĉambro?”

— „Mi; Bill O’Kahely; persono el Irlando; persono, kiu hodiaŭ posttagmeze alvenis Londonon; persono, kiu serĉas laboron, persono kun edzino kaj sep infanoj.

La gastoj ne insistis plu.

Tradukis Kava Rivereto.

KOMUNIKOJ

A. P. P. K.

Renovigo de la kotizoj kaj jarabonoj.

Oni insiste petas la grupojn kaj la abonantojn de la “Bulteno.. kiel eble plej baldaŭ pagi la kotizojn kaj jarabonojn por la jaro 1930.

Oni povas pagi ĉu rekte al la kasisto, S^o J. Cats. Gitschotellei, 252, Borgerhout, ĉu al la poŝtĉekkonto 230115 de S-ro Jacobs, Boomsche steenweg, 444, Antwerpen.

JARKUNVENO

La jarkunveno de A. P. P. K. okazos la 23 -an de januaro 1930 en la sidejo “Café Artes.. Statieplein.

Ĉiuj preparolotaj punktoj devas esti senditaj al la estraro antaŭ la 9-a de januaro 1930.

La 1-a Flandra Kongreso de Esperanto okazos en Antwerpen dum Pentekosto 1930 (La 7-an, 8-an kaj 9-an de junio).

MALLONGAJ NOVAJOJ

La **XXII**a universala Kongreso de Esperanto okazos en 1930 en Oxford (Anglujo).

La honora sekretario de Nov. Zelanda Esperanto Asocio estis informita, ke la mortinta S-ino Ensom el Christchurch, Nov-Zelando, fiksas laŭ sia lasta volo la belan sumon da 500 funtoj por starigi klasojn kaj por la instruado de Esperanto en Christchurch.

SERENADO.

Sen bru', knabin', malfermu al mi,
 Por ke ne vekigu najbaro.
 Aŭdiĝas dum nokt' nur dolĉmelodi'
 Flustrata de l' vent' al l' arbaro.
 Do, Karegulino, sen bru', sen spir'
 Malfermu la pordon je mia dezir'.
 Per paŝoj, paŝetoj, samkiel anĝel',
 Tuŝante apenaŭ la teron,
 Ho, venu al mi, dum lumbrila hel',
 Vi flugu ĉi tiun vesperon.
 Dormadas floretoj, jasmen', orkide',
 Dormetas lageto, nur am' dormas ne.
 Eksidu nun, nebulvualo kovras la tiliojn ;
 Al najtingal' kisoj niaj inspiras melodiojn,
 Roz' floradas, ekfloras je l' noktforir',
 Ĝoje, ĝoje pri l' plenumo de nia sopir'.

Rich. Straus

Trad. J. Karnas

GRUPA VIVO LA REKTA VOJO

La kunvenejo de "La Rekta Vojo.., estas nun en kafejo "De Gulden Kroon", Sint Jacobsmarkt, 98, apud la Frandra Teatro.

PROGRAMO

DE LA MONATO DECEMBRO

La 7-an; parolado de S^{ro} Jan van Schoor.
 La 14-an; kinematografvespero de S^{ro} Crols
 La 21-an; balo en Caf  des Billards, je la 8a h.
 La 28-an; Kristnask- kaj jarfesto en la sidejo, St Jacobsmarkt, 98.

JARKUNVENO.

Nia ĝenerala jarkunveno okazos la 11-an de januaro 1930-a je la 8-a en nia sidejo, St Jacobsmarkt, 98.

NIA IDEO

La 3-a; oktobro „Nia Ideo“ komencis senpagan kurson de Esperanto en Eeckeren. La kursgvidanto estas kamarado Alf. Verhulst, sekretario de „Nia Ideo“. La kurso okazas ĉiun ĵaŭdon de la 8a ĝis la 10a vespere, en la ejo "De Volksvlijt... Kloosterstraat, Eeckeren.

ONI FLUSTRAS.....

... ke en la ĉefartikolo de la Novembra numero de "Bulteno.., multaj nomoj estas nomataj, sed...

... ke la nomoj de la diplomitoj, je kies honoro oni ja ankaŭ aranĝis la feston, mankas ;

... ke la "Rekta Vojo", (la migranta klubo) denove disponas pri bela, intima saloneto kun fortepiano kaj bilardo, en la centro de la urbo, dank' al la senlacaj klopodoj de s-roj Libot, Meire kaj la vicprezidanto ;

... ke tamen al la Rektvojaninoj ne plaĉas la bilardo kaj.

... ke ili la spacon, kiun bezonas la bilardo, postulas por dancejo ;

... ke la Hobokena grupo jam de longe ne vizitis, nek invitis L. R. V. ;

... ke en Ronse kaj Nieuwpoort fondiĝis novaj grupoj.

... ke tiuj grupoj tre verŝajne konsistas el lernintoj de la skriba kurso "Appko... Aŭskultemulo.

Ĉu vi jam scias ke membro de

A.P.P.K. liveras bonegajn karbojn ?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen